

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimeili p. l. Germano

N° 10 - 11 kaj 12

Oktoebro, Novembro kaj Decembro 1959

9-a Jaro

COMUNICATO

Col IX° Congresso Nazionale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" tenute-
si il 22 settembre 1959 a Firenze nel quadro del 30-a Itala Nacia Kongreso de
Esperanto", si è aperto il nuovo anno finanziario 1959-60.

Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente il bol-
lettino di versamento nel Conto Corrente Postale n° 8/24094 intestato alla "Ita-
la Fervojista Esperanto-Asocio" "Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti".
Via Donato Creti 61 - Bologna (131). Si rammenta che le quote sociali 1960 sono:
-Associazione all'IFEA, alla IFEF, all'UEA ed alla FFI con abbonamento alla rivis-
ta "L'Esperanto" g. 1.150,- annue.

-Associazione solamente all'IFEA ed alla IFEF (per quei Soci che pagano le quo-
te di associazione alla FFI ed all'UEA direttamente e tramite i Gruppi Espe-
rantisti locali) g. 550,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per
il 1959 e che continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgen-
za le quote per il 1959 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderen-
ti (UEA, IFEF e FFI) eppure trasmettere le loro dimissioni.

9° CONGRESSO NAZIONALE DEI FERROVIERI ESPERANTISTI

Il 22 settembre nel quadro del 30° Congresso Nazionale di Esperanto, svolto-
si a Firenze dal 19 al 24 settembre, si è svolto, nell'Aula Magna della Facoltà
di Magistero, il 9° Congresso Nazionale dei Ferrovieri Esperantisti.

Erano presenti, graditi ospiti, ferrovieri esperantisti Austriaci, Francesi,
Polacchi, Svizzeri, Tedeschi e perfino un Norvegese venuto dalla lontana Tron-
dheim. In Esperanto, senza bisogno di interpreti, hanno portato al Convegno il
saluto dei ferrovieri dei rispettivi paesi: L'Ing. Eichinger di Vienna, la Sig.na
Lemonnier di Parigi, Presidente dell'Associazione Francese Ferrovieri Esperanti-
sti, ed il Sig. Greutert di Giubiasco (Ticino), Presidente dell'Associazione Sviz-
zera Ferrovieri Esperantisti; parlando anche succintamente delle realizzazioni
esperantiste attuate nei loro paesi dalle rispettive Amministrazioni Ferroviarie.

Durante i lavori del Convegno, sono stati trattati, oltre a problemi organiz-
zativi e finanziari, anche problemi riguardanti la partecipazione italiana al
prossimo 12° Congresso Internazionale dei Ferrovieri Esperantisti che avrà luo-
go dall'11 al 16 giugno 1960 in Helsinki (Finlandia); nonché del tema e delle
modalità per la effettuazione della "Fakprologo" che si svolge annualmente pres-
so il Congresso Internazionale dei Ferrovieri. Inoltre da parte di alcuni inter-
venuti è stata fatta la proposta di chiedere all'Amministrazione Ferroviaria la
concessione scambio dei biglietti gratuiti per l'estero anche ai ferrovieri pen-
sionati. E' stato pure letto un saluto dei dirigenti della "Internacia Federa-
cio Esperantista Fervojista - I.F.E.F." che si rammaricano di non poter parteci-
pare al nostro Convegno poichè contemporaneamente si è svolto il 1° conv. "F.E.R.N.

Il Convegno si è chiuso con un "ĝis la revido venontjare en Helsinki".

RAPORTO PRI LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VARSOVIO

En Varsovio, granda ĉefurbo de Pollando, naskiĝtero de D-ro L.L. Zamenhof, lulilo de Esperanto, okazis, en la grandega Palaco de Kulturo kaj Scienco, la 44-a U.K. de Esperanto, de la 1-a ĝis la 9-a de aŭgusto. Tiu gravega manifestacio, ĉu pro la nombro de partoprenantoj, ĉu pro la luksa kaj impona kongresejo, ĉu pro ĝia valoro morala kaj spirita, certe superas ĉiujn ĝis nun okazintajn kongresojn, tial ke ĝi postulas por si la nomon de Kongreso de la kongresoj. Estas malfacile trovi taŭgan epiteton por juste priskribi la amason da pozitivaj flankoj karakterizintaj tiun kongreson.

En la Kongresa Salonego enkondukas solene la kongreson la Simfonia Orkestro de Pola Radio, per uverturo majstre direktita de Stefan Rachon. La granda, kupolita Amfiteatro de la Palaco, kun siaj pli ol trimil seĝoj, en vicoj lokitaj unu pli alte ol la antaŭaj vicoj, antaŭ la 36-metra scenejo, donas komfortan sidlokon al ĉiu kongresano, en solene ĝoja etoso de kortuŝo, en kolorsimfonio el blanko, ruĝo kaj oro. En la fono de la scenejo, la verda kongresa flagego, nun kun aldōnita surskribo "WARSZAWA 1959" kaj kun grandcifera "44", impone impresas. Levigas s-ro Ing. Andrzej Rajski, prezidanto de L.K.K. por saluti la ministrojn, la prezidanton de U.E.A., la ambasadorojn, la reprezentantojn de la Ŝtatoj, ĉiujn kongresanojn. Oni demandas sin - li diras - kiu forto instigis la pli ol 3000 kongresanojn vojaĝi centojn, parte ĉe milojn da kilometroj por partopreni la Kongreson. Ĝi estas la granda ideo, krei interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj; nia kongreso estas miniaturo de la estonta pacigita homaro.

Parolas tuj poste la Prezidanto de U.E.A., Prof. D-ro Giorgio Canuto, deklarante sian feliĉon kaj privilegion prezidi la plej internacian kongreson en la mondo. Li dankas la polan registaron pro ĝia fakta kaj aktiva partopreno kaj ĉeesto, memorigas D-ro Zamenhof kaj akcentas la fakton ke ĉi tie troviĝas liajn plej vivantajn postsignojn, la plej fidelajn signojn de lia laboro, lian tombon ktp. Li legas poste salutleterojn de Prof. Edmund Privat, E. Malngren, Prof. Ivo Lapenna. Li memorigas pri la teruraj suferoj de Varsovio kaj en la komparo akcentas la forton de la urbo kiu renaskiĝis el ruinoj kaj sopiras nun interkompreniĝon kaj pacon. Tiam venos tempo - li konkludas - kiam ĉiu homo komprenos Esperanton, kaj tiam por ĉiam restos la memoro pri Ludoviko Zamenhof, filo de Pollando.

Sekvas la salutoj de la registaro kaj tiuj de la landaj asocioj.

Denove audiĝas la brila ludado de la Simfonia Orkestro de Pola Radio antaŭ ol la oficiala festoraro, Ivo Rotkviĉ, prenu la parolon. Lia voĉo falas sur la geokultantojn solene kaj agrable, kaj post rakonto pri la tragedia historio de Pollando, kaj post esprimoj pri la solena signifo de la 44-a, kiu okazas en la lulilo mem de nia afero, li finas per la vortoj: "Estu grandaj la sekvoj de la hodiaŭa tago!"

Kiel kutime la komuna kantaĉo de la himno "La Espero" konkludas la ceremonion, sed ĉi-foje, almenaŭ en nia persona sperto, la atmosfero atingas la kulminon de emocio kaj kortuŝo. La Simfonia Orkestro majstre akompanas la kantantajn kiuoj, ofte kun larmoj ĉe la palpebroj, ankoraŭfoje pronomas labori kaj batali "ĝis la bela sonĝo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos!"

Alia altvalora manifestacio, kiu fakte atingis la plej altan gradon de kortuŝeco, okazis merkrede, dum tago komplete dediĉita al la omaĝoj al Zamenhof. Mătene, je la 10-a, en strato Zamenhova, kun partopreno de multnombra Varsovia loĝantaro, oni malkovris memortabulon ĉe la domo kie travivis kaj suferis la Majstro. Mallongaj paroladoj de reprezentantoj la kvin kontinentojn honoris lian memoron: unue parolis la Ambasadoro de Vietnamo kaj s-ro Khwat Liat el Indonezio por la Azia kontinento. Por Ameriko s-ro C. Peterson el Los Angeles, por Afriko s-ro Isaac Nassif el Araba Respubliko, por Aŭstralio s-ro W. Hudson el Nov-Zelando, por Eŭropo, fine, parolas la hungara poeto Julio Baghy, profunde emociita, kiu taŭge interpretas la komunajn sentojn kaj reverencajn pensojn.

Pest la ceremonio en Zamenhofa Strato la ĉeestantoj procesie ekmarŝas al la Hebrea Tombejo, kie ili silente preterpasas la tombon de la Majstro, preskaŭ inunditan per florkronoj. La partopreno estas grandega: certe almenaŭ 4000 personoj riverence omaghas en silento la tombo de Zamenhof.

La sekvantan tagon, ĵaŭdon la 6-an, mi havis bonŝancon partopreni la perfervojan ekskurson al Bjalistoko, naskiĝurbo de Zamenhof, per ceremonio de enmasonigo de la unua ŝtono de la monumento al kreinto de Esperanto. Vere kortuŝanta ceremonio ankaŭ tie! Ĉirkaŭ 700 partoprenantoj, kiuj plenigas ok vagonojn de speciala trajno, atingas Bjalistokon je la 11-a matene. La tuta loĝantaro atendis nin antaŭ la stacidomo, festornamita per flagoj kaj floroj, kaj nin akompanis ĝis la centra placo. Duobla vico de skoltoj kaj studentoj flankis nian foriron de la stacidomo. Ĉe la centro de la urbo multnombra loĝantaro atendis nin. La urba muzikistaro ludis gajan muzikon: tuj poste, la prezidanto de la urba Konsilantaro inaŭguris la ceremonion. Per noblaj vortoj Prof. ro Canuto celebris la momenton, kaj kvankam fortega pluvé minacis difekti la tuton, neniu ferlasis sian lokon kaj volis propraokule ĉeesti la enmasonigon de la baza monumento. Ne tie finiĝis la ceremonio, ĉar ni poste marŝadis en longa vico, ĝis la konstruata lernejo kiu, jam nun nomiĝas "Lernejo D-ro Zamenhof". Tie denove brilaj paroladoj, inter kiuj klerega tiu de Juljo Bagy, honoris la Majstron, kaj la urbĉan kaj landĉan, lulilojn de Esperanto.

Ne estas eble priskribi ĉiujn aranĝojn. Ĉio estis interesa, ĉio altnivela ĉio brila: la specialaj kunsidoj de la Komitato, la ĝeneralaj asembleoj, la distraj aranĝoj, la balo, la teatraj prezentadoj, la fakaj kunvenoj, eĉ la diŝervoj en Esperanto, la infana kongreseto, la konkursoj, dum kiuj ni havis la ĝojon vidi du italojn premiatajn: s-ino Clelia Conterno Guglielminetti per la originala prozo, kaj Carlo Minnaja en la oratora konkurso; la Internacia Somera Universitato, certe la plej kultura aranĝo de la Kongreso, la grandioza akcepto de la tuta kongresanaro en la Salonoj de la Kongresejo kun persona invito flanke de "Ministro vicprezidanto de Pola popola Respubliko Piotr Jaraszewicz". Tiu impona akcepto, certe la plej grandioza kiun la esperantistoj iam ricevis dum iu ajn kongreso, meritas kelkan apartan vorton. Harkoro, brila lumigado, kaj senfinaj vicoj da tablegoj kotritaj per la plej tentaj bongustajoj kaj elektitaj trinkaĵoj, el kiuj oni povis preni laŭplaĉe! Trimil invitoj! Floroj, riĉaj vestoj, kristaloj, muzikoj, festanta bruo! Vere nepriskribebla spektaklo en nefergesebla vespero.

Kaj fine la Solena Fermo, en la Kongresa Salonego ankoraŭfoje tutplena, kie ankoraŭfoje renoviĝis la atmosfero de ĝojo kaj emocio. Dankon Pollando, dankon Varsovio pro tiu belega Kongreso, per kiu Vi tre digne honoris vian filon Zamenhof. Vi tre tre allogis nin, Pollando, kiun ni konsideras iom kvazaŭ la patrujon de ĉiuj esperantistoj. Ni neniam povos forgesi Vin.

GIUSEPPINA GAMBRINI

45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bruselo - 30. VII - 6. VIII. 1963 - Belgujo

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE L.M. BAÛDUINO, REĜO DE LA BELGOJ

Adreso: La koresponda adreso de la Loka Kongresa Komitato estas "45-a Universala Kongreso de Esperanto - Bruselo - Belgujo"

Telegramoj: La telegrafa adreso de la Loka Kongresa Komitato estas: "Esperanto Bruselo"

Honora Protektanto: Lia Maŝto Baŭduino, Reĝo de la Belgoj, akceptis esti Honora Protektanto de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kotizoj: Ĝis la 31-a de decembro 1959 validas la jenaj kotizoj: Kongresano 450 b.fr.; Edzino de kongresano 225 b.fr.; Junul(in)o ĝis 20-jaroj kaj studentoj 150 b.fr.

G.C. Fighiera, Konstanta Kongresa Sekretario

HELSINKI, 11-a ĝis 16-a de junio 1960

Honora Prezidanto: ERKKI AALTO, Ĉefdirektoro de S.R.H.

Loka Kongresa Komitato (L.K.K.)

Adreso: 12-a IFEF-kongreso, Helsinginkatu 6.B.5C, Helsinko, Finnlando

Prezidanto: N.G. Narvala. Vicprezidanto: Y. Louhevirta. Sekretario: A. Ruhanainen

Kasisto: Br. Koivula. Loĝado: O. Karstunen. Mangado: P. Palmala. Ekskursoj: Aaltonen

Helpantoj: F. Rantanen, B. Fonsen, A. Kerpi, M. Saarinen, Y. Hiltunen, M. Seppä.

Bankkonto de la L.K.K.: 12-a IFEF-kongreso, 60264 P.Y.P.Pahjois-Haaga, Finnlando.

Kongresejo: Helsingin Suomalainen Työväenopisto, Helsinginkatu 26, Helsinko.

B O N D E Z I R O J

EN OKAZO DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJ-
ESTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO", FRATE DEZIRAS FELI-
ĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ ANĈJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPE-
RANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

ESPERANTISTA ĈEBEZIRO

S-ro Abele Sangiorgi, membro de nia Asocio, la 8-an de novembro edzi ĝis al
F-ino Anna Neri, membro de la Junulara Esperanto-Grupo en Bologna.

Al la nova Esperanta paro; niaj gratulojn kaj bondezirojn.

RADIO RCMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 - Roma (Italia)

DISSENDOJ EN ESPERANTO - Jaro 1959-a

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) - Ondlongoj: metroj 30,90

= Mc/s. 9,71, metroj 41,24 = Mc/s. 7,27, metroj 50,34 = Mc/s. 5,96

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella

merkrede: S-ro Luigi Minnaja kaj vendrede: Prof. D-ro Vincenzo Musella

D E C E M B R O 1959 - a

1150 mardon la 1-an: Tra la literaturo

1151 merkredon la 2-an: Kuriero de Esperanto

1152 vendredon la 4-an: Italaj pentristoj: Ciotta

1153 mardon la 8-an: la luno en la itala literaturo

1154 merkredon la 9-an: Kuriero de Esperanto

1155 vendredon la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio

1156 mardon la 15-an: L.L. Zamenhof, okaze de la centa datreveno de la naskiĝo

1157 merkredon la 16-an: Kuriero de Esperanto

1158 vendredon la 18-an: Novaĵoj el Italujo

1159 mardon la 22-an: La sepa jarcento de la itala literaturo (La 19-a jarc.)

1160 merkredon la 23-an: Kuriero de Esperanto

1161 vendredon la 25-an: La vintra frostoj kaj la Kristnaska varmeo

1162 mardon la 29-an: Italaj kanzonoj en Esperanto

1163 merkredon la 30-an: Kuriero de Esperanto

La Fakestro: L. MINNAJA